






# Agado de nia Asocio

Ekde la publikigo de nia antaŭa Informilo, nia Astura Esperanto-Asocio daŭre dediĉiĝis al sia ĉefa celo: la disvastigado de la Internacia Lingvo.

En monato oktobro-2006 komenciĝis nova kurso de Esperanto en la ejo de nia Asocio. Same ol la kursoj de la antaŭaj jaroj, ĉi tiu estis gvidata de Santiago Mulas, honora prezidanto de AEA, kaj tiu situacio daŭris dum la tuta unua trimonato de la kurso, t.e. ĝis la feriado de la Kristnaska kaj Novjara festoj. Tiam okazis al Santiago grava akcidento kiu devigis lin konvaleski dumlonge kaj oni devis fari ŝanĝojn en tiu temo.

Sed antaŭe, la 17an de decembro, okazis la esperantista festo, pri kiu ni aparte raportas en tiu ĉi Informilo.

Fine de la jaro 2006 ni publikigis kroman revuon de nia presorgano: la 81a numero de HELECO. Plenumante la disponon de la antaŭa asembleo de nia kolektivo, la revuo denove estas publikigata nur en Esperanto post multjara periodo dum kiu ĝi aperis dulingve: en Esperanto kaj en la hispana. La kialo de tiu decido estis tio ke ĉar nun nia Asocio havas Interetan paĝon, per tiu ĉi rimedo ni povas pli efike aliri al la ekstera publiko kiu interesiĝas pri nia afero. Do, la revuo povas resti por esti distribuata nur en la esperantistaj medioj dum la retpaĝo estos la komunikilo adresata al la mondo en kaj ekster la esperantista movado.

En marto ĉi-jare komenciĝis enkonduka kurso de Esperanto en Oviedo. En ĝi partoprenis ĝis nun tri gelernantoj, unu knabino kaj du knaboj. Unu el la knaboj estis partopreninta en la Universitata kurso gvidita de Doktorino María José Álvarez Faedo dum la lerno-jaro 2005/2006. Same ol en tiu kurso, oni uzas la lernolibron de Miguel Gutiérez Adúriz. Tiu ĉi nova kurso estas gvidata de nia Prezidanto Carlos E. Carleos.

Marisa, nia bibliotekistino, jam finis la katalogadon de la libroj ekzistantaj en nia sidejo. Temas pri ducent kvardek volumoj, plus cent dudek ses ekzempleroj de la libro "Astura Bukedo", pri kiu estas detala informo en nia retpaĝo http://uica.info/~esperanto/abukedo.html . Nun restas katalogi la multajn revuojn ricevitajn dum la multaj jaroj de ekzistado de Astura Esperanto-Asocio. Kiam ĉi tasko finiĝos, ni publikigos la kompletan liston.

Restas nur informi pri tio ke la Fundacio de Esperanto asignis al nia Asocio subvencion de 400 eŭroj pro la universitata kurso de Esperanto kiun ni organizis pasintan jaron.